

Bazformoj de radikoj en vortaroj

Bertilo Wennergren

Resumo. Elektado de bazformoj por esperantaj radikoj en vortaro (*o*-finaĵa, *i*-finaĵa aŭ *a*-finaĵa kapvorto) povas doni problemojn al la vortaristo. Problemoj aperas precipe ĉe elekto inter *-o* kaj *-i*. En *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV; 2002, 2005) la elekto inter *i*-finaĵo kaj *o*-finaĵo okazis laŭ principoj, kiuj signifis ŝanĝon kompare kun la antaŭaj eldonoj. Ekzemple *cel'*, *glu'*, *plant'*, *teg'*, *urin'* kaj aliaj radikoj aperas nun sub *o*-finaĵa kapvorto, kio kontrastas unuavice kun la verbaj tradukoj de tiuj radikoj en la Universala Vortaro. La kaŭzo de tiu ŝanĝo estas, ke la *o*-formoj de tiuj radikoj normale ne havas agan signifon. La nova praktiko en PIV radikas en principoj skizitaj jam de Kalocsay, kaj oficialigitaj de la Akademio de Esperanto, kiu mem aplikis tiujn principojn en la *Baza Radikaro Oficiala* (BRO). PIV kaj BRO tamen ne ĉiam konsentas en la elekto de bazformoj ĉe tiaspecaj radikoj. Eventuale rolis en la elekto alio ol nura ekzamenado de la praktika lingvouzo. Se oni detale komparas gravajn esperantajn vortarojn el la tuta historio de esperanto, oni povas konstati multajn nekongruojn kaj hezitojn pri tiaj ĉi radikoj. Tial indas ellabori detalajn principojn praktike uzeblajn por elekto de bazformoj en esperantaj vortaroj.

Abstract. Choosing basic forms for Esperanto roots in dictionaries (*o*-ending, *i*-ending or *a*-ending) can cause problems for the lexicographer. Problems appear in particular when choosing between *-o* and *-i*. In *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV; 2002, 2005) the principles for choosing between *i*-ending and *o*-ending are different from those in earlier editions. E.g., *cel'*, *glu'*, *plant'*, *teg'*, *urin'* and other roots now appear with a noun as head word (*o*-ending), which notably differs from the verbal translations of those roots in Universala Vortaro. The reason for this change is that the *o*-forms of those roots normally do not carry the meaning of an action. The new practice in PIV originates in principles which were laid out by Kalocsay, and which were officialised by the Esperanto Academy, who applied them in *Baza Radikaro Oficiala* (BRO). PIV and BRO however do not always make the same choice of basic form for such roots. It is possible that concerns other than a mere examination of the practical usage have played a role in these choices. A detailed comparison of important Esperanto dictionaries throughout the Esperanto history show many incongruities and hesitations for such roots. Thus there is a need to work out detailed principles that can be used in practice when choosing basic forms in Esperanto dictionaries.

Zusammenfassung. Die Wahl der Grundformen von Esperanto-Wortstämmen (für Stichwörter mit einer *o*-Endung, *i*-Endung oder *a*-Endung) in einem Wörterbuch kann dem Lexikographen Probleme bereiten. Solche Probleme tauchen hauptsächlich bei der Entscheidung zwischen *-o* und *-i* auf. In *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV; 2002, 2005) wurde die Entscheidung zwischen *i*-Endung kaj *o*-Endung nach Prinzipien getroffen, die sich von früheren Ausgaben unterscheiden. Stämme wie z.B. *cel'*, *glu'*, *plant'*, *teg'*, *urin'* u.a. findet man jetzt unter einem Stichwort mit einer *o*-Endung, was hauptsächlich mit den Übersetzungen dieser Stämme durch Verbformen im *Universala Vortaro* kontrastiert. Die Ursache für diese Änderung ist, dass die *o*-Formen dieser Stämme normalerweise keine Handlungsbedeutung haben. Die neue Praxis im PIV entstammt Prinzipien, die schon von Kalocsay skizziert und von der Esperanto-Akademie – die diese selbst im *Baza Radikaro Oficiala* (BRO) praktiziert hat – offiziellisiert wurden. PIV und BRO stimmen aber in der Wahl von Stichwörtern bei dieser Art von Stämmen nicht immer überein. Möglicherweise haben bei der Wahl nicht nur einfache Untersuchungen des praktischen Sprachgebrauchs eine Rolle gespielt. Wenn man wichtige Esperanto-Wörterbücher aus der gesamten Esperanto-Geschichte detailliert vergleicht, kann man viele Unstimmigkeiten und Unsicherheiten bei diesen Stämmen feststellen. Deshalb lohnt es sich, detaillierte und praktisch anwendbare Prinzipien für die Auswahl von Stichwörtern in Esperanto-Wörterbüchern zu erarbeiten.

EN MODERNAJ ESPERANTAJ VORTAROJ la radikoj estas preskaŭ ĉiam prezentataj kiel plenaj vortoj kun finaĵo. Ekzemple la radiko *tabl'* aperas normale sub la kapvorto *tablo*, kiu havas *o*-finaĵon, dum la radiko *kur'* aperas sub la *i*-finaĵa kapvorto *kuri*, kaj la radiko *verd'* aperas sub la baza formo *verda* kun *a*-finaĵo. Tie ĉi mi volas trakti kelkajn problemojn pri elekto de tiaj bazformoj.

1. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

La plej grava esperanta vortaro estas la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV). En la Antaŭparolo de ties eldono de la jaro 2005 skribis jene la ĝenerala gvidanto Duc Goninaz (PIV 2005:25):

Sed la formo menciita kiel kapvorto ne estas nepre la “Fundamenta”. Por pluraj morfemoj (**cel/**, **direkt/**, **flor/**, **glu/**, **gut/**, **plant/**, **teg/**, **urin/**, **vest/...**) mi ne hezitis prezenti la kapvorton sub la formo, kiu plej bone povas klarigi la signifon de la aliaj leksikaj unuoj. Waringhien deklaris, ke li ne aŭdacis tion fari, ĉar por li tio signifis ŝanĝon de la “kategorieco” de la traktata “radiko”, kaj tion li ne volis fari sen decido de la Akademio. Sed, unuflanke, oni povas konstati, ke jam pli frue la aŭtoroj de PV kaj PIV permesis al si tiajn ŝanĝojn kompare kun la Oficialaj Aldonoj, kaj ke poste la Akademio faris, okaze de la kompilo de la Baza Radikaro Oficiala (1975), pli-malpli eksplikitajn

modifojn (**flor/**, **pak/**, **propagand/**, **raci/...**) en la ĝistiamaj kategorioj. Aliflanke, mi ne estas katenita de dogmo pri la “kategorioj”. Laŭ mia koncepto la elekto de kapvorto estas nur vortara oportunaĵo, bazita sur semantikaj konsideroj. Ĝi devas gvidi la uzanton ne al Prokrusta kongruiĝo kun teorio, sed al ĝusta laŭsenca uzado de la vortoj. Kaj, evidente, vortaristo ne povas elturniĝi per la truko “dukategorieco”: kapvorto estas nur unu. Se oni donas kiel kapvorton **urin/i**, kiel en la antaŭa eldono, la uzantoj tendencos dedukti, same kiel Kalocsay en unu el la famaj sonetoj, ke **urin/o** estas ago, kio evidente ne kongruas kun la vera uzado kaj la donita difino. La kelkaj ŝanĝoj, kiujn mi faris ĉi-kaŭze – plurokaze laŭ la tre sagacaj konsiloj de G. Lagrange, direktoro de la Sekcio pri Gramatiko de la Akademio en 1995–98 – estas do neniel arogaj decidoj pri iu “gramatika kategorieco”, kiun Waringhien defendis, sed pri kiu li devis konfesi, ke ĝi estas “pli elasta, ol oni ordinare opinias”. Tiuj kelkaj ŝanĝoj tute ne signifas partoprenon en senfruktaj polemikoj, sed nur zorgon pri la kohereco de niaj difinoj kaj konsekvence pri la uzebleco de nia vortaro.

Duc Goninaz tie esprimas praktikan kaj konkretan aliron al la tasko. Li rilatigas elekton de kapvorto “kiu eble spegulas ian teorian kategoriecon, eble ne” al praktikaj konsideroj: la elekto estu utila indikilo pri la ĝenerala konduto de la koncerna radiko en la efektiva vortfarado.

2. Hezitoj inter *-o* kaj *-i*

La ekzemploj cititaj montras, ke hezitoj pri kapvorta formo koncernas precipe elekton inter la finaĵoj *-o* kaj *-i*. La menciitaj radikoj *direkt'*, *flor'*, *glu'*, *gut'*, *pak'*, *plant'*, *teg'*, *urin'* kaj *vest'* aperis ĉiuj en la Universala Vortaro (Zamenhof 2007) kun tradukoj verbaj en la kvin naciaj lingvoj, kaj tial ili estas tradicie en vortaroj prezentataj sub verba kapvorto. En PIV (ekde ties eldono de la jaro 2002) ili tamen aperas sub *o*-finaĵa kapvorto. La kaŭzo estas, ke la *o*-formoj de tiuj radikoj normale ne havas agan signifon. Laŭ baza principo en la tradicia teorio pri radikokarakteroj, vorto, kiu konsistas el verba radiko kaj *o*-finaĵo, havu agan signifon kiel almenaŭ unu el siaj signifoj. Jen kiel skribis pri tiu temo Kalocsay:

La *o*-finaĵo signifas sole substantivon. En la senco de la *o*-finaĵaj vortoj do validiĝas la gramatika karaktero de la antaŭa radiko. Kun radiko substantiva ĝi esprimas *objekton* aŭ *koncepton* (homo, scienco), kun *adjektiva kvaliton*, aŭ *abstraktaĵon* (bono, belo), kun *verba agon* (skribo, manĝo). (Kalocsay 1970:23)

Kun *verba* radiko la *o*-finaĵo signas *agon*. Sed helpe de la kunteksto ĝi povas signi ankaŭ la *konkretan* manifestiĝon, aŭ la objekton de la ago. (Belaj konstruoj; perdita skribo; bona manĝo; lana kovro.) Krome ĝi povas signifi ankaŭ abstraktaĵon: *amo*, *penso* ekzemple estas abstraktaĵoj *amo*, *penso*. Por eviti miskomprenon, se la kunteksto ne helpas, oni anstataŭigas la *o*-finaĵon per la

sufikso de konkreto. Male, se oni volas speciale akcenti la agon, oni almetas la sufikson de la ago (ado). (Kalocsay 1970:24)

La sama ideo aperis ankaŭ en la Plena Analiza Gramatiko (Kalocsay & Waringhien 1980) kaj finfine ankaŭ en la akademiaj decidoj pri vortfarado. Tie tekstas interalie jene:

V. NI KONSTATAS [...]

C) ke la infinitive tradukitaj radikoj (= I-radikoj, verbaj radikoj)

1. kun la i-finaĵo havas la sencon donitan en la Universala Vortaro;
2. kun la o-finaĵo ili signas la nomon de la ago donita en la Universala Vortaro, ago konsiderata kiel fakto kaj kune kun sia konkreta manifestiĝo aŭ rezulto (*promeno, flego, parolo; altaj konstruoj, sigelita skribo, rompita baro*); (Akademio de Esperanto 2007a:52–53)

En alia parto direktita al la publiko en la formo de rekomendoj, tekstas jene:

- 2) **kun radiko de verba karaktero la finaĵo -o havas la signifon de ago kaj konkreta manifestiĝo aŭ rezulto de tiu ago**; ekz-e: *la kuro, la danco, la konstruo*. Kontraste, **aĵ** montras ion konkretan estigitan de la ago, dum **ad** havas la signifon de ago konsiderata en sia daŭro; ekz-e: *la dancado, la konstruado, la konstruaĵo*. (Akademio de Esperanto 2007a:58)

En la Baza Radikaro Oficiala (BRO) la Akademio entreprenis efektive difini la kategoriojn de la radikoj surbaze de tiuj principoj, kaj skribis tiurilate la jenon kun referenco al la ĵus citita teksto:

Rezultas el tiu teksto, ke, se o-derivaĵo de radiko supozita verba neniam povas signifi *agon*, ĝi tutsimple ne estas verba radiko.

Ekzemple, *floro, pako, urino* neniam signifas *agon*, sed male ion tute konkretan; sekve la radikoj *flor/*, *pak/*, *urin/* ja ne estas verbaj sed substantivaj. Plie de tiuj substantivaj radikoj tute logike kaj facile deriviĝas la verboj *flori, paki, urini*. Kaj tio plene respondas al la preskriboj de Zamenhof en siaj vortaroj rusa, germana kaj franca kaj ankaŭ al la uzado ĉe la bonaj aŭtoroj. (Akademio de Esperanto 2007b:30)

Oni povas konstati, ke la elekto de kapvortaj formoj en PIV, estas bazita rekte sur tiuj samaj ideoj kaj principoj.

En ĉiuj tiuj tekstoj oni parolis pri “ago” kaj “aga signifo”. Tiu esprimo vere kovras spektron de signifoj inkludantaj agojn, procezojn, sentojn, eventojn k. s. Iuj preferas paroli pri “fakto” anstataŭ “ago”. Ĉi-poste mi plu uzos esprimojn kiel “ago”, “aga signifo” k. s. en tiu tradicia maniero. Oni komprenu tion kiel oportunan mallongigon de “signifo aga, proceza aŭ simile”.

3. Malsamaj elektoj en PIV kaj BRO

PIV 2005 kaj BRO tamen ne ĉiam konsentas en la elekto de bazformoj. En la maldekstra tabelo ĉi-sube kelkaj ekzemploj estas listigitaj. En la dekstra tabelo estas montritaj kelkaj ekzemploj, ĉe kiuj la elektoj estas inversaj kompare kun la antaŭaj ekzemploj.

PIV	BRO	PIV	BRO
<i>alarmi</i>	<i>alarmo</i>	<i>komplezo</i>	<i>komplezi</i>
<i>bari</i>	<i>baro</i>	<i>konversacio</i>	<i>konversacii</i>
<i>donaci</i>	<i>donaco</i>	<i>operacio</i>	<i>operacii</i>
<i>glori</i>	<i>gloro</i>	<i>opozicio</i>	<i>opozicii</i>
<i>kolekti</i>	<i>kolekto</i>	<i>paŭzo</i>	<i>paŭzi</i>
<i>kopii</i>	<i>kopio</i>	<i>propagando</i>	<i>propagandi</i>
<i>loti</i>	<i>loto</i>	<i>reklamo</i>	<i>reklami</i>
<i>noti</i>	<i>noto</i>	<i>respekto</i>	<i>respekti</i>
<i>produkti</i>	<i>produkto</i>	<i>riverenco</i>	<i>riverenci</i>
<i>profiti</i>	<i>profito</i>	<i>sonĝo</i>	<i>sonĝi</i>
<i>provizi</i>	<i>provizo</i>	<i>spezo</i>	<i>spezi</i>
<i>registri</i>	<i>registro</i>	<i>striko</i>	<i>striki</i>
<i>rekompenci</i>	<i>rekompenco</i>		
<i>sonori</i>	<i>sonoro</i>		
<i>stampi</i>	<i>stampo</i>		
<i>tondri</i>	<i>tondro</i>		
<i>verki</i>	<i>verko</i>		
<i>vundi</i>	<i>vundo</i>		

Por kelkaj radikoj en la lasta grupo ne estas facile kompreni, kial PIV elektis *o*-finajajn kapvortojn, ĉar la koncernaj *o*-formoj estas en PIV klare difinitaj kiel agaj. Simile PIV elektis *o*-finajan kapvorton ankaŭ por la jenaj radikoj (finiĝantaj per *-aci'* aŭ *-ici'*), kvankam la *o*-formoj estas agaj eĉ laŭ PIV mem: *abnegacio*, *arbitracio*, *deklaracio*, *demonstracio*, *ekspozicio*, *manifestacio*, *navigacio*, *operacio*, *opozicio*, *revelacio*, *spekulacio*. Oni komparu kun la sekvaj radikoj, kiuj ja ricevis verban kapvorton en PIV tute konforme al la aga signifo de la responda *o*-formo: *adicii*, *apelacii*, *interpelacii*. En la okazo de *ekpozicii'* ankaŭ BRO elektis *o*-formon, kvankam temas pri aga *o*-vorto.

Estas malfacile trovi motivon por tiuj elektoj. Ili ŝajnas tute nekongruaj kun la deklaritaj principoj. Sed aliflanke PIV ja skribis, ke temas nur pri “vortara oportunaĵo, bazita sur semantikaj konsideroj”, kaj ke oni “ne estas katenita de dogmo pri la ‘kategorioj’”. En la okazo de radikoj prezentataj sub *o*-formo kun aga signifo, tio tamen ne povas konduki al ia reala mislerno aŭ misuzo. Ĉiu ajn verba radiko (kaj ankaŭ ĉiu ajn adjektiva radiko) povas aperi

sub *o*-formo en vortaro sen praktika misrezulto, kondiĉe ke tia *o*-formo vere ekzistas en la praktika uzo, kaj kondiĉe ke la vortaro donas ĝustan difinon de la *o*-formo kun mencio de ties aga signifo (aŭ ties eca signifo).

Realan problemon prezentas tamen tiuj radikoj, kiuj aperas sub *i*-finaja bazformo, kvankam iliaj *o*-formoj ne estas agaj. Se oni ne volas, ke lernanto pensu, ke ekzemple *baro* estas ago (= ‘barado’), oni prefere ne prezentu la radikon *bar'* sub la kapvorto *bari*, kiu precize tion sugestas. Se oni ne volas instrui, ke *loto* signifas pli-malpli ‘lotado’, tiam oni ne uzu *loti* kiel bazformon. Se oni ne volas, ke homoj ekuzu *foso* en la signifo ‘fosado’, oni ne prezentu *fos'* kiel verbkarakteran.

Sed en tio jam troviĝas grava principa demando: Kio decidus, ke tia *o*-formo ne uziĝu kun aga signifo?

4. La praktika uzado

Ĉiuj tie ĉi cititaj verkoj iel referencas al la signifo de la koncernaj *o*-formoj en la uzado. Precipe temas tiuokaze pri la nuntempa uzado (la uzo de radikoj ja povas ŝanĝiĝi, kaj tio povas transporti radikojn de unu kategorio en alian). La principo estas: Se *o*-formo de radikoj ne aperas kun aga signifo en la nuntempa praktika uzado, tiam la radikoj ne (plu) estas agaj.

En PIV oni tamen en kelkaj okazoj anstataŭe aldonis agan signifon al *o*-formo. Oni aldonis signifon, kiu mankis en malnovaj eldonoj (PIV 1970 kaj PIV 1987), evidente por tiel pravigi, ke la radikoj povas aperi sub verba kapvorto (konforme al la tradicia maniero prezenti la koncernan radikojn en vortaroj). Ne ĉiufoje estas klare, ke tiu aldona signifo estas ĉerpita el la reala lingvouzo.

Tiel la redaktantoj de PIV 2002 agis ekzemple en jenaj okazoj, kies radikoj en PIV aperas sub verba kapvorto:

provizo ‘ago provizi kaj ties rezultoj’;
kolekto ‘ago kolekti, aro da kolektitaj personoj aŭ objektoj’;
kopio ‘ago kopii kaj precipe ties rezultoj’;
stampo ‘ago stampi kaj ties rezultoj’;
produkto ‘ago produkti kaj ties rezultoj’;
registro ‘ago registri kaj ties rezultoj’;
foso ‘ago fosi kaj ties rezultoj’.

Sed en neniu el tiuj okazoj aperas ekzemplo, en kiu la koncerna *o*-vorto efektive havas agan signifon. Al mi ŝajnas, ke tiuj agaj signifoj estas elpensitaj de la vortaristo. Laŭ mia impresoj, en la reala lingvouzo tiuj agaj signifoj apenaŭ iam ajn aperas (kvankam multaj lingvouzantoj eble tamen tute akceptus tian uzon).

Ĉu do povas esti, ke rolis en tiuj ĉi elektoj aliaj faktoroj ol ekzamenado de la reala lingvouzo?

5. *aĵ*-formoj

En tri el la cititaj okazoj, *produkto*, *registro* kaj *foso*, povas esti, ke rolis la ekzisto (kaj fakta uzateco) de *aĵ*-formo de la sama vorto: *produktaĵo*, *registr-aĵo* kaj *fosaĵo* havas pli-malpli la saman signifon kiel respektive *produkto*, *registro* kaj *foso*. Tia kunekzisto de simpla *o*-formo kaj formo kun aldona *aĵ*, estas tipa por verbaj radikoj. Normale la *o*-formo havas tiam ankaŭ agan signifon, kaj oni povas uzi laŭbezone *-ad-* aŭ *-aĵ-* por precizigi la signifon. Se la radikoj *produkt'*, *registr'* kaj *fos'* estas ne-verbaj (sed substantivaj), tiam efektive estas nenormale, ke ekzistu *aĵ*-formo kun la sama signifo kiel la simpla *o*-formo. Tio povas esti indiko, ke la radiko eble tamen estas verba, kaj ke eble tamen la *o*-formo rajtas aperi kun aga signifo.

Ĉe ankoraŭ kelkaj radikoj, kiujn PIV prezentas kun substantiva bazformo (sen aga signifo), simile aperas tia *aĵ*-vorto kun signifo pli-malpli sama kiel la signifo de la simpla *o*-formo. Tiaj estas *fek'*, *pak'* kaj *vest'*. Ili aperas jene en PIV:

fek/o. Ekskremento, eligita el la anuso [...] \sim **i** (ntr) Eligi \sim on. [...] \sim **ado**. Ago de fekanto. \sim **aĵo**. Amaso da \sim oj, precipe bestaj.

pak/o. Aro da objektoj, kunligitaj aŭ kunaranĝitaj por esti protektataj aŭ pli facile transporteblaj [...] $\star \sim$ **i** (tr) **1** Kunaranĝi plej malvaste iajn objektojn, aŭ ilin ligante per ŝnuro, aŭ envolvante en paperon aŭ ŝtofon, aŭ enŝovante en sakon, aŭ enpremanante en kofron aŭ valizon, aŭ ordigante en keston [...] \sim **ado**. Ago de tiu, kiu \sim as. $\star \sim$ **aĵo**. Tuto de la \sim oj, kiujn oni portas kun si ĉe vojaĝo aŭ kiujn oni ekspedas per publika transportilo [...]

vest/o 1 Ĉio, kion oni portas sur si, por kovri la korpon [...] $\star \sim$ **i** (tr) **1** Kovri per \sim o, por ŝirmi kontraŭ malvarmo aŭ kaŝi nudecon [...] $\star \sim$ **ado**. Ago, per kiu iu \sim as [...] \sim **aĵo**. Ĉiu el la pecoj de \sim o. [...] (PIV 2005:323, 830, 1227)

Tie oni povas vidi, ke PIV donas signifodistingon inter la simpla *o*-formo kaj la formo kun aldonita *-aĵ-*. Similan distingon ĝi donas ankaŭ ĉe *fos'*, kiu tamen aperas kun verba kapvorto:

\star **fos/i** (tr) **1** Fari kavaĵon, eltirante teron [...] \sim **o**. Ago \sim i k ties rezulto, i.a.: **1** \sim ita kavaĵo [...] \sim **ado**. Agado de \sim anto [...] \sim **aĵo**. Longforma \sim o [...] (PIV 2005:360)

Pro la aŭtoritateco de PIV mi longe pensis, ke tiuj signifodistingoj inter la *o*-formoj kaj *aĵ*-formoj konsistigas lingvan realaĵon. Sed detala pristudado kaj de la Zamenhofa uzo, kaj de la nuntempa uzo, montris, ke praktike tiuj distingoj apenaŭ ekzistas. En la efektiva lingvouzo *feko* samsignifas kun *fekaĵo*,

pako kun *pakaĵo*, *vesto* kun *vestaĵo* kaj *foso* kun *fosaĵo*. (Krome la asertitaj signifodistingaj efikoj de la aldona *-aĵ-*, estas en tiuj tri okazoj tute diversaj, kaj apenaŭ klarigeblaj per iaj principoj.) Zamenhof ja kutimis distingi inter vojaĝa *pakaĵo* (valizaro), kaj nevojaĝaj *pakoj*, sed eĉ ĉe Zamenhof tiu distingo ne estas tute konsekvenca. Ekzemple aperas ĉe li *pakaĵeto*, kiu ne esprimas etigon de vojaĝa valizaro, sed kiu simple estas malgranda pakita objekto. Ĉiuokaze *pakaĵo* en la signifo ‘vojaĝa pakitaĵaro’ ne estas io tute alia ol *pako*. Temas nur pri nuanca distingo. Nuntempe oni tre ofte uzas *pakaĵo* samsignife kiel *pako* aŭ *paketo*.

Ni havas do tamen ĉe ĉiuj el tiuj radikoj tipan karakterizaĵon de verbaj radikoj: por esprimi la konkretan rezulton aŭ konkretan manifestiĝon de la ago montrata de la verba formo, oni povas uzi ĉu simplan *o*-formon, ĉu *o*-formon kun aldona *-aĵ-*. Mankas nur, ke la simpla *o*-formo havu ankaŭ agan signifon, por ke ni povu konstati klarajn okazojn de verbaj radikoj prezentindaj sub verba kapvorto.

Ĉu do ĉiuj tiuj agosignifoj vere mankas? Ĉu aga uzo de la koncernaj *o*-vortoj estas tute fremda kaj erara?

6. Praktika uzado kaj akceptebla uzado

Foresto el la praktika uzo ne nepre egalas al erareco aŭ neebleco. Povas esti, ke certa uzo de vorto estas tute akceptebla por la lingvouzantoj, kaj tute ĝusta laŭ ilia lingvosento *kvankam praktike ili apenaŭ aŭ eĉ tute ne praktikas tiun eblon*. Ja povas esti, ke oni tute akceptas ekzemple *feko* en la signifo ‘fekado’, kvankam oni mem kutimas por tio ĉiam diri *fekado*. Povas esti, ke oni tute ne havas ion kontraŭ uzado de ekzemple *vesto* en la signifo ‘vestado’, kvankam oni preferas mem ĉiam uzi la formon *vestado*, kiu estas pli klareprime aga ol la formo *vesto*.

Laŭ mi necesas iom pli nuance kompreni la aserton de BRO, ke “se *o*-derivaĵo de radiko supozita verba neniam povas signifi *agon*, ĝi tutsimple ne estas verba radiko” (Aktoj de la Akademio II:37). Oni ne apliku tiun regulon aŭtomate al ĉiu *o*-derivaĵo, por kiu oni ne sukcesas trovi agosignifan uzon en la praktiko. Necesas esplori ne nur la praktikon, sed ankaŭ la pretecon de la lingvouzantoj akcepti tian uzon.

Tia akceptebleco de aga uzo povas iafaje manifestiĝi en konstruitaj ekzemploj kadre de gramatikaj diskutoj, kie oni ne malofte utiligas tiajn latent-aĵojn de la lingvo, kiuj malofte aŭ eĉ neniam renkontiĝas en ordinara lingvaĵo, ekzemple ‘ebla je porto’ uzata kiel klariga analizo de *portebla* (Kaloscay 1980:398), kvankam konstruoj kiel *ebla je porto* apenaŭ uziĝas en ordinara lingvaĵo. Tiaj uzoj ene de “la gramatika dialekto” ne taŭgas kiel ekzemploj de reala lingvouzo aŭ kiel atestoj de akceptebleco. Por pruvi, ke radiko kiel

ekzemple *fek'* kaj *donac'* estas prezentinda sub verba bazformo, oni serĉu akcepteblecon de *feko* kaj *donaco* kun aga signifo precipe ekster diskutoj pri gramatiko kaj vortfarado, kaj prefere ĉe ne-gramatikistoj.

En la preparado de BRO la Akademio evidente pritaksis ĉian uzon de *o*-formo netroveblan en la lingva praktiko kiel neaprobindan, kaj tial pluraj radikoj, kiujn multaj spontanee volus klasi kiel verbajn, kaj kiujn PIV prezentas kiel verbajn, aperas en BRO kun *o*-finaĵo: *baro, loto, alarmo, sonoro, tondro, donaco, rekompenco, provizo, gloro, profito, kolekto, kopio, noto, produkto, registro, stampo, verko, vundo*. Ne por ĉiuj el tiuj radikoj PIV aperigas *o*-formon kaj *aĵ*-formon samsignifajn (aŭ pli-malpli samsignifajn). Ekzemple ĉe *proviz'*, *kolekt'*, *stamp'* kaj *kopi'* tia *aĵ*-formo ne menciigas. Sed tio ne signifas, ke tia *aĵ*-formo samsignifa aŭ similsignifa kiel la simpla *o*-formo ne povas ekzisti. Kredeble multaj lingvouzantoj pritaksus tiajn *aĵ*-formojn de tiuj radikoj kiel tute akcepteblajn kaj senerarajn alternativojn al *o*-vorto sen *aĵ*-sufikso.

7. Gvidado de la uzanto

En ellaborado de vortaro laŭ mi tre indas apliki la konsilon de Duc Goninaz, ke “la elekto de kapvorto [...] devas gvidi la uzanton al ĝusta laŭsenca uzado de la vortoj” (PIV 2005:25).

La baza atentindaĵo ĉe hezito inter *o*-formo kaj *i*-formo estu la jeno:

Se radiko estas prezentata sub verba kapvorto, la uzanto de la vortaro rajtas tion kompreni tiel, ke la *o*-formo de la koncerna radiko povas havi agan signifon (tiu sama ago, kiun esprimas la verbo). Se vortaristo ne deziras rekomendi tian uzon, la vortaristo ne prezentu la radikon kun verba kapvorto.

Analoge ĉe hezito inter *o*-formo kaj *a*-formo: Se radiko estas prezentata sub adjektiva kapvorto, la uzanto de la vortaro rajtas tion kompreni tiel, ke la *o*-formo de la koncerna radiko povas havi ecan signifon (tiu sama eco, kiun nomas la adjektivo). Se vortaristo ne deziras rekomendi tian uzon, la vortaristo ne prezentu la radikon kun adjektiva kapvorto.

Prezento kun substantiva kapvorto estas sufiĉe neŭtrala. Se la *o*-formo ricevas ĝustan kaj plenan difinon, tia prezento povas ĉiam bone funkcii, ankaŭ kiam la radiko vere estas aga (aŭ eca) laŭsignife.

8. Konkretaj principoj

Jen propono de konkretaj bazaj principoj uzeblaj por elekto de bazformoj en esperantaj vortaroj:

8.1. Verbe prezentindaj radikoj

Verbe prezentindaj estas radikoj, ĉe kiuj la *i*-formo kaj la *o*-formo estas samsignifaj, t. e. la signifo de la *o*-formo, aŭ almenaŭ unu el ĝiaj signifoj, estas pli-malpli identa al la signifo de la responda *i*-formo, krom ke la du formoj kondutas gramatike malsame. La *i*-formo de tia radiko montras faradon de ia ago aŭ ian procezon, kaj la *o*-formo estas nomo de tiu sama ago aŭ procezo, do esence samsignifa kiel *o*-formo kun *ad*-sufikso (krom la daŭreca nuanco de *ad'*). Ekzemploj:

montr': *montri* kaj *montro* esprimas la saman agon;

rid': *ridi* kaj *rido* esprimas la saman agon;

viv': *vivi* kaj *vivo* esprimas la saman staton;

rotaci': *rotacii* kaj *rotacio* esprimas la saman agon;

am': *ami* estas la ago havi certan senton, *amo* estas tiu sento mem;

abomen': *abomeni* estas la ago havi certan senton, *abomeno* estas tiu sento mem.

En multaj okazoj la *o*-formo de tia radiko havas, apud aga aŭ agosimila signifo, ankaŭ signifon de io ne-aga kun tre proksima rilato al la ago, ekzemple rezulto aŭ alispeca manifestiĝo de la ago. Ekzemploj:

konstru': *konstrui* estas ago, *konstruo* estas aŭ tiu sama ago, aŭ rezulto de tia ago, aŭ maniero en kiu tia ago okazas;

elekt': *elekti* kaj *elekto* estas ambaŭ agoj, sed *elekto* ankaŭ povas montri tion, kion oni elektas;

difekt': *difekti* estas ago, *difekto* estas aŭ nomo de tiu ago, aŭ rezulto de tiu ago.

En iuj okazoj la signifo de la *o*-formo de radiko, kiun oni tradicie prezentas vortare en verba formo, ne estas tiu de la efektiva ago montrata de la *i*-formo, sed nur rezulto de tiu ago, kiun esprimas la *i*-formo de la radiko, aŭ io alia ne-aga kun proksima rilato al tiu ago. Por esprimi la koncernan agon en substantiva formo, necesas aldoni *ad*-sufikson. Tiaj radikoj ne aperu kun verba bazformo. Ekzemploj:

embaras': *embarasi* estas la ago kaŭzi certan staton, *embaraso* estas tia stato, sed apenaŭ uziĝas por la ago kaŭzi tian staton. Por la ago necesas uzi *embarasado*.

profit': *profiti* estas la ago ricevi utilon aŭ gajnon de io, *profito* estas tia utilo aŭ gajno. Por nomi la agon oni uzu *profitado*;

stamp': *stampi* estas la ago fari markon per stampilo, *stampo* estas marko tiel farita. Nomo de la ago estas *stampado*.

ŝvit': *ŝviti* estas la ago eligi salan likvon tra la poroj de la haŭto, *ŝvito* estas tiu likvo mem. Por la ago oni diru *ŝvitado*.

Ĉe verbe prezentindaj radikoj la *a*-formo tipe havas signifon tre elastan kaj varian, ekzemple 'rilata al la ago, faranta la agon, tia kiel la ago, havanta econ rilatan al la ago' k. s. Ekzemploj:

montr': *montra* 'servanta por montri, rilata al montrado' k. s.;

rotaci': *rotacia* 'rilata al rotaciado, rotacianta' k. s.;

am': *ama* 'rilata al amo aŭ amado, amanta' k. s.

Ĉe iuj verbe prezentindaj radikoj la *a*-formo havas en praktika uzado ecan signifon, eventuale apud la pli normala signifo montrita ĉi-antaŭe. Tiam temas ofte pri eco, kiu povas esti rezulto de la koncerna ago, sed la *a*-formo montras tiun econ mem aparte de la koncerna ago. Ekzemploj:

suspekt': *suspekta* 'tia, ke ĝi vekas suspekton';

fiks': *fiksa* 'nemovebla, tia, kia io povas fariĝi pro fiksado';

fals': *falsa* 'mensogece ŝajnvera, tia, kia io povas fariĝi pro falsado'.

8.2. *a*-finaĵe prezentindaj radikoj

a-finaĵe prezentindaj estas radikoj, kies *a*-formo kaj *o*-formo estas esence samsignifaj, t. e. la signifo de la *o*-formo, aŭ unu el ĝiaj signifoj, estas pli-malpli identa al la signifo de la *a*-formo, krom ke la du formoj kondukas gramatike malsame.

En la plej tipaj okazoj la *a*-formo de tia radiko montras priskribon per ia eco aŭ kvalito, kaj la *o*-formo estas nomo de tiu sama eco aŭ kvalito, do esence samsignifa kiel *o*-formo kun *ec*-sufikso. La simpla *o*-formo tiam normale esprimas tiun econ kiel abstraktan kvaliton (sendependan de io havanta la econ). Ekzemploj:

bon': *bona* estas eco/kvalito, *bono* estas tia sama eco/kvalito rigardata en si mem, *boneco* estas denove tia sama eco/kvalito, sed rigardata kiel apartenanta al io kiel ties eco;

fort': *forta* estas eco/kvalito, *forto* estas tia sama eco/kvalito rigardata en si mem, *forteco* estas denove tia sama eco/kvalito, sed rigardata kiel apartenanta al io kiel ties eco;

long': *longa* estas eco/kvalito, *longo* estas tia sama eco/kvalito rigardata en si mem, *longeco* estas denove tia sama eco/kvalito, sed rigardata kiel apartenanta al io kiel ties eco;

ruĝ': *ruĝa* montras la econ havi certan koloron, *ruĝo* estas tia koloro rigardata en si mem, *ruĝeco* estas la eco havi tian koloron.

Ĉe *a*-finaĵe prezentindaj radikoj la *i*-formo tipe havas signifon pli-malpli egalan al 'esti tia' (ne 'igi tia', nek 'iĝi tia'). Ekzemploj:

bon': *boni* 'esti bona' (eventuale kun iom pli ageca, aktiveca aŭ impreseca nuanco), *boni* nepre ne povas signifi 'igi bona' nek 'iĝi bona';
fort': *forti* 'esti forta' (eventuale kun iom pli ageca, aktiveca aŭ impreseca nuanco), *forti* nepre ne povas signifi 'igi forta' nek 'iĝi forta';
ruĝ': *ruĝi* 'esti ruĝa, impresi ruĝe', sed nepre ne 'igi ruĝa' nek 'iĝi ruĝa'.

8.3. *o*-finaĵe prezentindaj radikoj

o-finaĵe prezentindaj estas ĉiuj ceteraj radikoj. Ekzemploj:

seĝ': seĝo estas meblo;
tajlor': tajloro estas persono/profesiulo;
barbar': barbaro estas homo;
leon': leono estas besto;
plant': planto estas kreskaĵo;
urb': urbo estas loko;
bros': broso estas ilo;
glu': gluo estas duonlikva substanco uzebla por kunfiksi aĵojn;
matematik': matematiko estas scienco/fako;
original': originalo estas la origina ekzemplero de io.

Ĉe *o*-finaĵe prezentindaj radikoj la *i*-formo montras agon aŭ ion agosimilan, kiu proksime rilatas al la signifo de la *o*-formo, sed kiu ne povus esti rigardata kiel la sama afero kiel tio, kion esprimas la *o*-formo. La rilatoj inter la afero de la *o*-formo kaj la ago de la *i*-formo estas tre diversspecaj. Ekzemploj:

tajlor': *tajlori* 'labori kiel tajloro';
leon': *leoni* 'konduki kiel leono';
plant': *planti* 'meti planton en teron por ke ĝi kresku';
bros': *brosi* 'uzi broson por ĝia kutima celo';
glu': *glui* 'fiksi per gluo';
matematik': *matematiki* 'fari matematikaĵn kalkulojn/operaciojn'.

Ĉe *o*-finaĵe prezentindaj radikoj la *a*-formo tipe havas signifon tre elastan kaj varian, ekzemple 'rilata al tia afero, tia kiel tia afero, estanta tia afero' k. s. Ekzemploj:

reĝ': *reĝa* 'rilata al reĝo, tia kiel reĝo, apartenanta al reĝo, estanta reĝo', k. s.;
matematik': *matematika* 'rilata al matematiko, karakterizata de matematiko', k. s.;
barbar': *barbara* 'tia kiel barbaro(j), rilata al barbaro(j), apartenanta al barbaro(j)', k. s.;
original': *originala* 'tia kiel originalo, apartenanta al originalo, rilata al originalo', k. s.

8.4. *o*-finaĵa prezento de agaj radikoj

Iuj radikoj, kies *o*-formo nomas agon aŭ procezon, estas tamen en la praktiko nur tre malofte uzataj en verba formo aŭ eble eĉ neniam tiel uzataj. Povas tiam eĉ esti, ke la preciza signifo kaj uzomaniero de la verba formo estas malklara. Ekzemple povas aperi hezitoj, ĉu la verbo estu transitiva aŭ netransitiva. En tiaj okazoj estas tamen konsilinde prezenti la radikon sub *o*-finaĵa kapvorto. Tia prezento tute ne povas havi negativajn sekvojn, se oni nur donas ĝustan kaj kompletan difinon de la kapvorta *o*-formo. Al tiu ĉi grupo oni ankaŭ povas kalkuli tiajn radikojn, kies signifo estas nur iom simila aŭ parenca al ago.

Tiaj radikoj estas ekzemple *abandon'* (asekura termino), *festival'*, *abnegaci'*, *ekspozici'*, *gradaci'*, *tenis'*, *genocid'* k. a.

Ĝenerale do, se montriĝas iel probleme konkrete efektiviĝi prezenton kun *i*-finaĵa kapvorto (ekzemple se tio necesigus starigi kiel kapvorton verbon praktike apenaŭ uzatan), oni preferu *o*-finaĵan prezenton.

9. Kompara tabelo

Por ilustrii, kiom povas varii la elekto de kapvorta formo en diversaj vortaroj, jen tabelo prezento de kelkaj radikoj, kies karaktero (signifo, bazformo) estas iel duba. Aperas en la tabelo nur radikoj, ĉe kiuj la hezito okazas inter *o*-karaktero kaj *i*-karaktero.

UV	Universala Vortaro (Zamenhof 2007)
1OA	Unua Oficiala Aldono (Lingva Komitato 1919)
2OA	Dua Oficiala Aldono (Lingva Komitato 1919)
3OA	Tria Oficiala Aldono (Lingva Komitato 1921)
OR	Oficiala radikaro (Wüster 1923)
Kabe	Vortaro de Esperanto (Kabe 1925)
PV	Plena Vortaro de Esperanto (Grosjean-Maupin 1934)
OV	Oficiala Vortaro (Grenkamp 1937)
PIV	Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV 1987, PIV 2005)
8OA	Oka Oficiala Aldono (Aktoj de la Akademio II)
BRO	Baza Radikaro Oficiala (Aktoj de la Akademio II)
<i>o</i>	la radiko aperas kun <i>o</i> -finaĵo
<i>i</i>	la radiko aperas kun <i>i</i> -finaĵo
<i>i (o)</i>	la radiko aperas kun <i>i</i> -finaĵo, sed menciigatas ankaŭ <i>o</i> -formo kies signifo (laŭ indiko en la koncerna vortaro mem) estas sufiĉe klare neaga
<i>o/i</i>	la radiko aperas kaj kun <i>o</i> -finaĵo, kaj kun <i>i</i> -finaĵo (dukategoria prezento)

	UV 1905	1OA 1909	2OA 1919	3OA 1921	OR 1923	Kabe 1925	PV 1934	OV 1937	PIV 1987	8OA 1974	BRO 1974	PIV 2005
<i>adici'</i>			<i>i</i>		<i>i</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>		<i>i</i>	<i>i</i>
<i>alarm'</i>		<i>i</i>			<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>apelaci'</i>				<i>o</i>	<i>i</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>			<i>i</i>
<i>bar'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>cel'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>o</i>
<i>direkt'</i>	<i>i (o)</i>				<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>o</i>
<i>donac'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>fek'</i>							<i>i</i>		<i>i (o)</i>			<i>o</i>
<i>flor'</i>	<i>i (o)</i>				<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>o</i>
<i>fos'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o/i</i>	<i>i</i>
<i>glor'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>o</i>	<i>i</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>glu'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>o</i>
<i>gut'</i>	<i>i (o)</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>			<i>o</i>
<i>interpelaci'</i>						<i>o</i>	<i>o</i>		<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>o</i>
<i>kolekt'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>komplez'</i>	<i>o</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>konversaci'</i>				<i>o</i>	<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>kopi'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>			<i>i</i>
<i>lot'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>not'</i>	<i>i (o)</i>				<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>operaci'</i>		<i>i</i>			<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>opozici'</i>			<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>pak'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>o</i>
<i>paŭz'</i>	<i>o</i>				<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>pis'</i>									<i>i</i>			<i>i</i>
<i>plant'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o/i</i>	<i>o</i>
<i>produkt'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>profit'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>propagand'</i>		<i>o</i>			<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>proviz'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>registr'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>reklam'</i>		<i>o</i>			<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>rekompenc'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>respekt'</i>	<i>o</i>				<i>i</i>	<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>riverenc'</i>	<i>o</i>				<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>sonĝ'</i>	<i>o</i>				<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>sonor'</i>	<i>i</i>				<i>i</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>spekulaci'</i>				<i>o</i>	<i>i</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>			<i>o</i>
<i>spez'</i>	<i>o</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>stamp'</i>	<i>o</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>strik'</i>	<i>o</i>				<i>i</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>teg'</i>	<i>i (o)</i>				<i>i</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>i</i>	<i>o</i>
<i>tondr'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i</i>		<i>o</i>	<i>i</i>
<i>urin'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>			<i>o</i>
<i>verk'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>
<i>vest'</i>	<i>i (o)</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>o</i>
<i>vund'</i>	<i>i</i>				<i>o</i>	<i>o</i>	<i>i (o)</i>	<i>i</i>	<i>i (o)</i>		<i>o</i>	<i>i (o)</i>

Referencoj

- Akademio de Esperanto (1992). *Aktoj de la Akademio III. 1975–1991*. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, No 11. Redaktis André Albault k. a. Roterdamo; Parizo.
- Akademio de Esperanto (2007a). *Aktoj de la Akademio 1963–1967*. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, No. 9. 2-a eldono. Roterdamo. ISBN 978-908118701-5.
- Akademio de Esperanto (2007b). *Aktoj de la Akademio II. 1968–1974*. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, No. 10. 2-a eldono. Roterdamo. ISBN 978-908118702-2.
- Grenkamp, S[alo] (1937). *Oficiala Vortaro de Esperanto*. Paris: Girault, Saint-Cloud.
- Grosjean-Maupin, E. [Émile] (1934). *Plena Vortaro de Esperanto*. 2-a eldono. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Kabe [kaŝnomo de Kazimierz Bein] (1925). *Vortaro de Esperanto*. 3-a eldono. Paris: Esperantista Centra Librejo.
- Kalocsay, K[álmán, Kolomano] (1970). *Lingvo Stilo Formo. Studoj*. Tria, parte tralaborita eldono. Oosaka: Pirato.
- Kalocsay, K[álmán, Kolomano]; Waringhien, G[aston] (1980). *Plena Analiza Grammatiko de Esperanto*. 4-a eldono. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Krause, Erich-Dieter (1999). *Großes Wörterbuch Esperanto–Deutsch*. Hamburg: Helmut Buske Verlag.
- Lingva Komitato (1909). *Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro*. Raportis Th[éophile] Cart. Paris: Esperantista Centra Oficejo. (Esperantista Dokumentaro, Kajero dek-tria.)
- Lingva Komitato (1919). *Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro*. Raportis Th[éophile] Cart. Paris: Esperantista Centra Oficejo. (Esperantista Dokumentaro, Kajero trideka.)
- Lingva Komitato (1921). *Tria Oficiala Aldono al Universala Vortaro*. Paris: Esperantista Centra Oficejo.
- PIV 1970. *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970)*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- PIV 1987. *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento (1987)*. 4-a eldono. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- PIV 2002. *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002)*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- PIV 2005. *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2005)*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Wüster, Eugen (1923). *La oficiala radikaro (ĝis februaro 1923) kun enkonduko kaj notoj*. Berlin kaj Dresden: Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Zamenhof, L. L. (2007). *Fundamento de Esperanto*. Dekunua Eldono kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A[ndré] Albault. Pisa: Edistudo.

Pri la aŭtoro

Bertilo Wennergren estas membro de la Akademio de Esperanto, kaj direktoro de ties Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. Li publikigis la verkon *Plena Manlibro pri Esperanta Gramatiko* (El Cerrito 2005).

Adreso de la aŭtoro

Bertilo Wennergren (bertilow@gmail.com),
Alte Dorfstraße 3,
DE-19073, Schossin, Germanujo.

Ricevita en provizora formo 2006-08-15; en fina formo 2006-11-08. Akceptita 2006-11-22